Bolanta Kaldrono

Bremen

INFORMILO 279
de la
Esperanto - Grupo Bremen

BSW

Marto - Majo 2006

Sekr: D-ro Hans Walter Krüger, Dordrechter Str 36, 28259 Bremen, Tel: 0421 561943
Informoj: Prezidanto Ost.i.R Hellmut Grebe, Tel: 0421 3963480
Kasistino: Ruth Bohn, Tel: 0421 382715
Red: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 HB, Tel/Fax 8476806, hartig.hd@t-online.de

Ni donacas al vi

Ni donacas al vi, kion vi certe ne havas:
Ni donacas al vi tempon por ĝoji kaj ridi.
Tempon, kiun vi povas lerte utili.

Ni donacas al vi tempon por pensi,
ne nur por vi mem, sed ankaŭ por donaci.

Ni donacas al vi tempon ne por trorapidi,
sed tempon por esti kontenta.

Ni donacas al vi tempon por trovi vin mem,
por konstati la feliĉon.
Ni deziras al tempon por pardoni kulpon.

Ni deziras al vi

havi tempon por vivi.

Vizitu nin en interreto: www.esperanto.de/bremen
Jen vi trovos nian programon, nian aktualan Informilon kaj ĉion, kio okazas ĉe ni.

Nia Programo

Nova Kunvenejo

>>> Wir treffen uns ab **Januar 2006** zum Gruppenabend in der Waller Heerstrasse 58.(Zwischen Helgolander und Elisabeth Str.)
Markant ist das Schild „**HOKI 58**“ im Fenster.
(Parkmöglichkeit besteht vor dem Kino 46)

>>> Abweichungen werden unter „**Nia programo**“ bekannt gegeben.

Achten Sie darum besonders in den Programmankündigungen wo unsere Treffen stattfinden.

La 8an de februaro **Unsere Jahresversammlung**

en nia nova kunvenejo je la 20-a horo

1. Begrüßung
2. Wahl des Protokollführers und Wahlleiters
3. Bericht des Schriftführers
4. Bericht der Kassiererin
5. Bericht der Revisoren
6. Redakteur des Informilos
7. Entlastung des Vorstandes
8. Entlastung der Kassiererin
9. Wahl des Vorstandes und der Revisoren
10. Verschiedenes

Anträge und Änderungen bis zum 1. Februar an Hellmut Grebe Tel. 396 34 80

La 8an de marto: je la 20a horo **ĉe familio Grebe**
Bremerhavener Str 112, Tel: 396 34 80

Lumbildprelego pri tre interesa vojaĝo al vidindaĵoj en Rumanio.

La 12an de aprilode

La 10an de majo

La 14an de junio

La 12an julio

En aŭgusto ni ferios

Retrospegulo

Lingvaj studadoj. La 9-an de novembro.

Kunvenis 10 gemembroj, kiuj evidente ĉiuj sentis la neceson plibonigi siajn lingvajn kapablajn.

Sed antaŭe ni memoris al nia amiko **Kurt Meyer**, kiu ĉiam klopodis plibonigi nian lingvokapablon en Esperanto. Li ofte trovis momentojn, en kiuj li poligis nin per demandado aŭ diskutado.

Sincere ni bedaŭris lian forpaŝon.

Antaŭ ol ni ekstadadis, ni traktis kelkajn problemojn, kiel la situacio pri nia nova kunvenejo, la kotizpago per banka transpago kaj la internacia renkonto en Oldenburg. Elfriede Coburger prezenti al ni la programon.

Franz Kruse kaj Hellmut Grebe preparis la lingvan ekzercadon. Franz pelis nin tra la sia-/ ŝia-/lia /ilia ktp. kio estis obstaklokuro por ni. Hellmut okupis nin per la participoj, kiujn li antaŭe detale klarigis al ni. Fine ni konstatis, ke ni ja konis tiujn gramatikajn aferojn, sed ilin ne plene regis. Estis ja fruktodona entrepreno.

Ni konsciis, ke estis la lasta kunveno en nia ĝisnuna kunvenejo. La vivo plukuras kaj ni esperas pri la estonteco de nia grupo en la nova ejo.

Kun danko al niaj instruistoj ni adiaŭis ĝis la revido en januaro sekvontjare.

Hg

La 7an de decembro Zamenhoffesto ĉe familio Hartig

Raportis Dr. Hans-Walter Krüger

La 7-an de decembro entute 11 personoj festis nian tradician Zamenhoffeston ĉe Dieter kaj Lisa Hartig. Por faciligi la komunikadon finfine ĉiuj sidis ĉiraŭ la softablo kai ĝuis la antaŭkristnaskan atmosferon de la ornamita ĉambro. La kuketoj kaj la diversaj dolĉaĵoj bongustis. La vizitantoj bedauris S-inon Grebe, kiu falis de sia biciklo kauze de glatglacio kaj suferis komplikitan frakturon de ŝultra artiko. Elisabeth Kuhl-Kruse kunportis diskedon kun interesa muziko: Fremdlandaj sonoj (kun germanaj tekstoj!) plenumis la ĉambron, la tiel nomata "Bremer Immigrantenorchester" ludis. Heidrun Nordwall rakontis pri la Esperanto-aktivecoj de sia gepatroj dum la jaroj antau la dua mondmilito. ŝi ankaŭ montris malnovan vojaĝprospekton pri Norderney kaj menciis, ke en sia iama loĝejo sur la insulo Norderney en ne elpakitaj kestoj verŝajne dormetus Esperanto-memoraĵoj. Dieter

Hartig amuzis nin per diversaj anekdotoj pri pasintaj Fervojistaj Kongresoj. Oni manĝis, oni trinkis teon, vinon ...kaj kelkaj kuraĝuloj eĉ specialan brandon ("Bullenschluck"); la tempo forflugis. Koran dankon, kara Dieter kaj Lisa, por via afabla invito kaj la hejmeca aranĝo. HWK

Renkontiĝo en Oldenburg la 17an de decenbro 2005

Raportis Hellmut Grebe

Kvarope ni (Ruth Bohn, Guthild Meyer, Markus Beckmann kaj mi) glitis en aŭtomobilo sur freŝe glaciiĝita neĝo al Oldenburg. Nur sur la lasta parto de la distanco la stratoj estis senneĝaj kaj permesis normalan rapidecon.

Malgraŭ nia malfruiĝo ni ankoraŭ ĝustatempe renkontis la aliajn geesperantistojn el Groningen kaj el la grupo Subvisurgo ĉe Elfriede Coburger. Ni veturis komune per aŭtobuso en la urbocentron kaj marŝis al la kastelo. Tie gvidistino komencis rondiradon tra la salonoj kun nia tuta grupo. Mi provis sekvi ŝiajn klarigojn (pri istorio, arkitekturo, diversaj dukoj kaj pri detaloj en la salonoj) kaj traduci en Esperanton por niaj nederlandaj geamikoj.

Kun intute 21 personoj ni tagmanĝis en itala restoracio «Roma Vecchia» Mi pensas, ke ĉiuj komforte satiĝis. Poste la manĝado ni havis tempon por promeni tra la kristnaska foiro aŭ laŭlonge de la montrofenestroj.

Je la 16-a 30 ni denove kolektiĝis ĉe Elfriede Coburger, kiu regalis nin per kukoj kaj kafo. En tiu rondo mi fine povis transdoni flageton al la grupo Subvisurgo (kiel donaco de la Bremena grupo por la 10-jara jubileo, kiun ni kunfestis jam komence de junio.

Certe ni forlasis gajaj, kontentaj, sataj kaj dankemaj tiin agrablan renkontiĝon en Oldenburg. Nia danko precipe celas al Elfriede Coburger, kiu ĉon organizis kaj preparis tiel bone kun kelkaj helpantoj!

Kiom da kapoj – tiom da opinioj. Sed ĉiuj konsentas pri Esperanto !